



# Novjorka Prismo

Numero 143

Aprilo 2005

## *La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia aprila kunveno*

**DATO:** Vendredon, la 15-an de marto 2005, 6:30-9:00 ptm

**LOKO:** United Federation of Teachers  
50 Broadway, Second Floor, Room A  
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC

**PROGRAMO:** 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – Vespero de ŝercoj kaj ludoj. Ĉiu partoprenanto  
kunportu ŝercon. (Ludoj ankaŭ estos bonvenaj.)

– Pilar RAU montros sian videon pri nia Zamenhofa Festo. ★

## Protokolo de la kunveno de la 18-a de marto 2005

Stuart GREEN malfermis la kunvenon je 7:01 ptm. Li bonvenigis la ĉeestantojn. Li speciale bonvenigis nian gaston, Zlata, filinon de amiko de Eŭgeno. Ĉeestis entute 16 personoj ĉe la kunveno.

La protokolo de la februara kunveno estis akceptata.

Poste, laŭ la invito de Stuart, ni ĉiuj unuope prezentis nin al Zlata.

Sekvis anoncoj. Tomaso ECCARDT anoncis, ke la anoj de lia Esperanto-kurso komencos legi la libron "Gerda Malaperis." Post pli da preparado lia nova kurso baldaŭ komenciĝos.

Stuart memorigis la klubanojn, ke

ili pagu la kotizon por la jaro 2005. Ankoraŭ estas kelkaj nepagintoj. Oni devus sendi pagon al nia kasistino Sonja SOSKINA kun la verda slipo enkovertigita kun la *Prismo*.

Stuart ankaŭ petis ideojn pri prelegoj por venontaj kunvenoj. Tiuj, kiuj volas prelegi devus paroli kun Maki SANO.

Pilar RAU anoncis, ke kiam ŝi povos, ŝi preparos pli da videodiskoj de sia filmo pri la antaŭa Zamenhofa festo.


Post la anoncoj, Maki montris al ni ekzamenon, kiun trapasis studentoj de la angla lingvo en la Universitato

de Tokio. La ekzameno inkluzivis rakonton en la angla pri d-ro Zamenhof kaj Esperanto.

Sekve, Tomaso ECCARDT faris prelegon. Li parolis pri la historio de Esperanto en la urbo Novjorko, pri la organizaĵoj, kies sidejoj estis ĉi tie, kaj pri la interesaj esperantistoj, kiuj loĝis kaj laboris ĉi tie en la frua parto de la antaŭa jarcento.

Post la prelego ni diskutis ĝin iomete, kaj fine Stuart fermis la kunvenon oficiale je la naŭa horo. ★


Protokolis:  
Jeff BLAKESLEE



Tom Eccardt dum sia prelego, kaj kelkaj el la fotoj, kiujn li distribuis:



Edmond Privat



W.F. Salzbacher



Klub-kunveno en Novjorko en 1953.

## IBM Plaza

Dek du ESNY-anoj neformale kunvenis ĉe IBM Plaza je la 3-a de aprilo. Oni diskutis plurajn aferojn inkluzive la vivon kaj morton de la papo, kaj la novan ARE ĉe Silver Lake, kiu anstataŭigos Okemon. ★  
– Tom ECCARDT



## Fordono

Je la nokto de la printempa ŝanĝo al la somera horo, mi ĉeestis "Fordon-



## Ne Poluu la Vivmedion!

Oni povas bazi la etikon sur vivmediaj konsideroj, kun la ĝenerala regulo: **Ne poluu al la aliaj homoj la vivmedion.** Ĉiu sur la tero volas vivi en bona vivmedio, kaj tial la regulo povas esti ĝenerale akceptita kaj servi por interetiko. Jen novaj Dek Ordonoj, bazitaj sur ĉi tiu regulo:

1. Ne poluu la aeron, akvon, aŭ grundon; ne malŝparu fosiliajn brulaĵojn; ne detruu arbojn kaj alian verdaĵon; ne produktu troan forĵetaĵon.
2. Ne poluu vian komunumon per bruo, murskribaĉoj, aŭ disrubajo.
3. Ne nasku tro da infanoj, aldonante al la jam tro granda mondloĝateco

on", tranokta prezentado de muziko, poezio, teatro, kino, projekcio, kaj reikio. Nia samklubano, Tomaso Morgan ludis kontrabason kun unu membro de marŝbando, kiam mi eniris. Mi ĉeestis nur du horojn, sed dum tiu tempo, mi vidis glasharmoni-

kaj ĉiaj akompanantaj poluado kaj forkonsumado de la provizoj de la tero.

4. Ne malatentu la edukadon de viaj infanoj, aŭ eduku ilin esti neetikaj.
5. Ne estu malzorgema en la farado de aferoj, kiuj tuŝas aliajn, kiel via metio, via veturigado, aŭ la bontenado de via sano.
6. Ne vendu aŭ uzu narkotaĵojn.
7. Ne ataku aŭ murdu.
8. Ne molestu aŭ seksatencu.
9. Ne ŝtelu, rabu, homŝtelu, aŭ neleĝe malliberigu.
10. Ne difektu aŭ detruu la proprajn de aliaj.

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!  
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Aprilo 2005**

**15**

### ESNY KUNVENO

*Vespero de ŝercoj kaj ludoj.*

Ĉiu partoprenanto kunportu ŝercon.  
(Ludoj ankaŭ estos bonvenaj.)  
Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

**Majo**

**1**

### Tagmanĝo

*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM Plaza*  
(Limdato por kontribuajoj por *Prismo* 144)

### ESNY KUNVENO

**20**

*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

United Federation of Teachers (UFT)

50 Broadway, Second Floor, Room A  
(between Bowling Green and Exchange Place)

"IBM" Building Atrium (antaŭa nomo)  
590 Madison Avenue (56th Street) NYC  
Street level, in the Atrium

kon, elektronikan muzikon, afrikajn frap-instrumentojn, dancadon, ktp. Poste, Tomaso legis Esperantajn poemojn. Mi ege ĝuis la aferon, kiu okazis ĉe la Projektejo (The Project Room), 619 E. 6th Street. ★

– Tom ECCARDT

En ordonoj unu ĝis kvin la homoj estas poluantoj. En ses ĝis dek ili estas mem la poluiloj.

Iom da poluado (1-5) estas neevitebla en la vivo sed minimumigenda; esti poluilo mem (6-10) estas nepardonoble, kaj tiaj homaj poluiloj devus esti forigitaj el la vivmedio.

### Subteno fare de Konfuceo

*Analektoj II.3:*

La Majstro diris: "Se vi gvidos la popolon per leĝoj kaj gardos la ordon inter ili per punoj, ili detenos sin de malbonoj sen scii la hontosenton. Se vi gvidos ilin per la forto de la virto kaj gardos la ordon inter ili per la de-reguloj, ili havos la hontosenton kaj memvole korektos siajn erarojn." ★

– Maurice WITTENBERG

### ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041  
[http://www.geocities.com/esperanto\\_nyc](http://www.geocities.com/esperanto_nyc)

**Prezidanto**  
Stuart Green  
(631) 751-5683

**Koresponda Sekretariino**  
Rochelle F. Grossman  
(718) 457-1490

**Protokolisto**  
Jeff Blakeslee  
(718) 383-2715

**Vicprezidanto**  
Thomas Eccardt  
(212) 477-6516

**Kasistino**  
Sofiya Soskina  
(914) 813-2495

**Program-Direktorino**  
Maki Sano  
(212) 614-9184

**Redaktoro**  
Jim Medrano  
(212) 982-5029

**Subredaktoroj**  
Thomas Eccardt  
Nancee Medrano

**Desegnistino**  
Mary Pulley

Sendu kontribuajojn al:  
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103  
e-poŝto: medrano@mac.com

© 2005 Esperanto Society of New York

### Novjorka Prismo

Numero 143 – Aprilo 2005  
ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>